CNT — AIT — FAI

INTERNACIA LABORIST-ASOCIO

# INFORMA BULTENO

NACIA KONFEDERACIO DE L'LABORO

ADRESO: ESPERANTO-FAKO AV. DURRUTI 32-34
BARCELONO — HISPANIO

IBERIA ANARKISTA FEDERACIO

II-a jaro — 25 OKTOBRO 1937 — Numero 8

## TUTMONDA PROLETARO! EK' AL AGADO!

Laboristoj, fratoj, miaj, estas bolanta la milito. La sovaĝeca k barbareca milito. La faŝismo, la kapitalismo, la imperialismo, la eklezio estigis ĝin. K ni, kion faris ni, miaj malriĉaj fratoj? Kion ni entreprenis por antaŭforigi ĝin? No ve! Neesprimebla estas nia tragedio! Nia mema tragedio! Ni, la laboristoj, la produktistoj de ĉiuj vivbezonaĵoj, fariĝis aŭtomatoj en la manoj de kelkaj tiranoj k satrapoj. K jen ni reciproke ekstermas nin. Pro aliulaj interesoj k profitoj. La monstroj Hitler k Musolini perforte veturigas niajn fratojn germanajn k italajn al Hispanio por mortigi niajn fratojn, niajn samklasanojn hispanajn. K niaj hispanaj fratoj por defendi sin devas ankaŭ mortigi. Mortigi kiujn? Siajn fratojn, siajn samklasanojn germanajn k italajn. La samo okazas en Ĉinio. Ĝin invadas la japana imperialismo. Miloj da niaj japanaj fratoj, fleksitaj sub la ŝarĝo de la ekspluatado k la tiranio, estas rekrutataj de la die kretena Mikado k liaj militistaj kakatuoj, k kiel gregojn estas sendataj al fremda lando por murdi. Kiujn? Siajn fratojn ĉinajn. La virinojn k la infanojn de niaj samklasanoj. K ankaŭ niaj fratoj ĉinaj por defendi sin k siajn samfamilianojn vidas sin devigataj murdi




Sed, fratoj, ĉu tiom malfortaj, senpovaj, dependaj estas ni por servi kiel rimedoj al aliuloj? Ni—la produktistoj de la vivbezonaĵoj? Ni—la kreantoj de la ekonomiaj interrilatoj? Ni—la motoroj de la socia evoluo. Ni—la traktoroj de la kulturo? Ĉu biologie tiel sendefendaj, kompatindaj estas ni?

Ne! Defendilojn ni disponas. Potencajn, granitajn defendilojn ni havas. La striko, la saboto, la rekta agado. Ili detronigas la reĝojn. Ili forsilentigas la tiranojn. Ili senpovigas la ekspluatistojn. Ili liberigas nin el la moderna jugo, el la ekomomia jugo.

Laboristoj, ni apliku ilin. En vasta, en tutmonda skalo ni apliku ilin. Generala striko tutmonda paralizu, atrofu la trafikon. Glaciiĝu la maŝinoj en la fabrikoj, en kiuj ni fabrikas kuglojn, bombojn, tankojn k aliajn mortigilojn al la faŝistoj. Senmoviĝu la ŝipoj, la vagonaroj, kiuj veturigas niajn fratojn al la hombuĉejoj, kiujn aranĝas la faŝismo k la kapitalismo ĉekape de Hitler, Musolini, Franko, Mikado. Ekfloru barikadoj en ĉiuj ĉefurboj, urbetoj. Ekfloru kiel Majaj rozoj la barikadoj sur la stratoj de Berlino, Parizo, Romo, Milano, Tokio, Londono! Leviĝu vi multmilionaj malsataj senlaboruloj el Nov-Jorko! Leviĝu fratoj el Berlino k Laipcigo, el Romo k Milano k liberigu vin el la torturistoj, perfortuloj, kiuj enkarcerigas viajn fratojn pro tio ke ili rifuzas iri militi! Liberiĝu el la kulpuloj pri via mizero k via malsato!

Viaj hispanaj fratoj donis al vi ekzemplon. Ili dispremis la faŝismon en Barcelono, en Valencio, en Madrido. K multajn monatojn daŭrigas la batalon. K ili luktas ne pro sia patrio. Ni, la laboristoj havas unu patrion. La Mondo ja estas nia patrio. K ne por defendi la patrion de la perfidulo Franko, Musolini k Hitler veturigas niajn fratojn germanajn k italajn helpe al li! La hispanaj laboristoj renkontas la organizitan reagon de la internacia kapitalismo, kies supera stadio estas la faŝismo. K ne por defendi sian patrion estas irigataj niaj japanaj fratoj por ekstermi la ĉinajn. Ili estas uzataj kiel rimedojn por la efektivigo de la japana ekspansiema imperialismo.

Tutmonda proletaro, al niaj ĉinaj k hispanaj samklasanoj maksimuman solidaron efektivan, esprimeblan praktike unike per la saboto, per la ĝenerala striko—per la rekta agado!

Tutmonda proletaro! ek' al agado!

PARIO.

# SOLIDARO INTERNACIA ANTIFAŜISTA -- SIA

En n-ro 6 de "In. Bul." ni informis pri la fondo de la organizo Solidaro Internacia Antifaŝista (SIA), kies tasko estas helpi la viktimojn de la faŝismo.

SIA estas lojala organizo aprobita de la Valencia registaro 8an de Junio 1937, k la kamaradoj, kiuj volas fondi en sia lando filion de ĝi, devas adopti ĝiajn statutojn, kiujn ni ĉitie eksponas, al la leĝoj de sia lando k tiele krei lojalan organizon.

## STATUTARO

*Celo.*

1. Kun la titolo "Solidaro Internacia Antifaŝista" fondiĝas kun sidejo en Valencio organizo, kiu surprenas la sekvantan:

*a*) Helpi al la organizoj k individuoj antifaŝistaj laŭ la ekzistantaj ebleco j en ĉiuj landoj, kiujn povas atingi la solidaro.

*b*) Priatenti la bezonantojn, kiuj en ajna formo estas batalantoj antifaŝistaj aŭ viktimoj de la faŝismo, proporciante al la samaj ĉiuklasan helpon ekonomian, sanitaran, instrukcian k pledon antaŭ la juĝtribunaloj.

c) Praktiki la reciprokan helpadon inter la parencaj organizoj k grupiĝoj, ĉiam kiam estas necese k ili ĝin reklamas, kiel en okazo de milito kontraŭ la faŝismo, tiel en defendo kontraŭ la malamikoj de la Libero.

*d*) Subteni interrilatojn kun ĉiuj personoj k organizoj parencaj el la mondo por starigi komunecon en ĉio kio kondukas al la atingo de la celoj de ĉi Organizo.

2. Por la atingo de la menciitaj celoj, Solidaro Internacia Antifaŝista disvolvados sian agadon sur la plej pura tereno de la homara solidaro, ignorante ĉian enmiksadon politikan k religian.

*Organizado.*

3. Solidaro Internacia Antifaŝista estos konsistigata el sekcioj, kiuj povas fondiĝi en pluraj landoj de la Terglobo, konforme al la statutaro de SIA

4. Por la fondiĝo de ĉiu sekcio landa k ties aliĝo al SIA estos necesege, ke ĝi alsendu kopion de la akto pri sia fondiĝo, la numeron de la membroj-fondantoj, la nomon de la Konsilantaro aŭ de la Direktanta Komitato, la domicilon, kie estos lokigota, la regularon de la sama k ĉiujn detalojn, kiujn konsideras necesaj la Generala Konsilantaro de SIA por organizi sian statistikaron k plenumi la lojalajn kondiĉojn.

5. Ĉiu landa sekcio, kiu aliĝas al Solidaro Internacia Antifaŝista, vidos sin devigata pagi laŭ la numero de la anoj regulan monatan kotizon, kiu estos determinata konforme al la kotizkarakterizoj de ĉiu lando.

6. La ekonomia subteno de SIA estos akirata de la kotizpagoj, venantaj de la landaj sekcioj k de la diversaj donacoj, kiujn ĝi rekte ricevas.

7. SIA devigas sin diskonatigi en la Revuo aŭ la Bulteno, kiun publikigas aŭ pro manko de tia, en iu celparenca gazeto, la staton de la kaso k la variadon de la aliĝintoj.

*Direkcio k Administarcio.*

8. La direktado de SIA estos ekzercata de Generala Konsilantaro, kiu estos konsistigata el unu membro de ĉiu landa sekcio aliĝinta k de la Plenum-Komitato elektita de tiu,

9. La Plenum-Komitato estos formata el Generala Sekretario, Kasisto k helpkalkulisto de 5 voĉdonantoj, kiuj estas indikeblaj de la loka Organizo, kie rezidas la Plenum-Komitato.

10. La fakoj komisiataj al la personoj cititaj en la antaŭa paragrafo estos la sekvantaj:

1. La Generala Sekretario estos la Respondeculo pri la plenumado de la decidoj adoptataj de la Generala Konsilantaro k estos la Reprezentanto de la Organizo, estos kekfoje respondeca pri la pagoj de la sama.

2. La Kasisto estos komisiata ricevi ĉiujn kotizojn k donacojn k antaŭvidi kiajn monkvantojn povas la Organizo elspezi por la atingo de siaj celoj, ĉiam kun prijuĝo de la Generala Sekretario. Li raportos pri la monstato en ĉiuj ordinaraj kunvenoj de la Generala Konsilantaro.

3. La Kalkulisto starigos la kontrolon de la vario de la enspezoj k havos sub sia respondeco la kalkuladon.

4. Inter la voĉdonantoj estos distribuataj la ceteraj funkcioj precipigante la Sekciojn kiel tiujn de la Propagando, Statistiko, Interrilato, ktp. ktp.

*Plenkunvenoj k Kongresoj*

11. La Generala Konsilantaro kunvenas kvar fojojn jare, okazigante ĉiun kunvenon en la natura trimonato, k la plena kunsido okazas, kiam laŭ prijuĝo de la Plenum-Komitato ĝin ebligas la cirkonstancoj.

12. En la plenkunsidoj ordinaraj estos pristudata la sekvanta tagordo:

1. Ekspono k aprobo de la Generala Sekretario.
2. Ekzameno k aprobo de la kontaro.
3. Starigo de plano por agado dum la sekvanta trimonato.
4. Kompletigo de la tagordo por la Kongreso, se ĝi okazus.

Dum la eksterordinaraj plenkunsidoj oni limiĝos al la diskutado super la kialoj, kiuj determinus la kunvokon.

13. SIA celebros ordinaran jaran Kongreson, kiun ĉeestos kun rekta reprezentado la Generala Konsilantaro k ĉiuj aliĝintaj landaj sekcioj.

14. En la Ordinaraj Kongresoj la Generala Konsilantaro prezentos raporton, kiu servos kiel bazo pri la prijuĝado de la realigita laboro k por la fiksado de la novaj aktivecoj entreprenendaj.

Dum la eksterordinaraj kongresoj oni pritraktados nur la problemojn, kiuj okazigis la koncernan kongreson.

*Dissolviĝo*

15. Solidaro Internacia Antifaŝista ne estas dissolvebla dum unu el la sekcioj landaj deziras ĝin plu subteni.

16. En okazo de dissolviĝo la monsumo k la cetera inventaro, estos transdonota al la Organizaĵo pri simila helpo, kiu estas plej celparenca.

***La laboristoj el la Pariza regiono, kunvenintе laŭ iniciativo de la Franca Anarkista Federacio la 8an de Oktobro, adresis al la Valencia registaro la sekvantan telegramon:***

***"4000 laboristoj el la Pariza regiono, kunveninte la 8an de Oktobro en la salono Mutualité en Parizo, protestas indigne pro la persekutoj kontraŭ la elito de F. A. I., C. N. T., U. G. T. k P. O. U. M., pro tio ke ili volas konservi la revolucian sencon de la antifaŝisma lukto en Hispanio. Ili postulas de la Valencia registaroo k de la Generalitato la ĉesigon de tiuj ekscesoj k persekutoj stultaj. Ili postulas la tujan liberigon de ĉiuj enkarcerigitaj kamaradoj. Kontraŭe ili rajte taksos antaŭ la franca proletaro tian malaman persekuton kiel helpon al la faŝismo".***

# LA KERNO DE LA HISPANA MILITO

Hispanio konsistigas rezervon el la fundamentaj minelementoj necesaj por la militindustrio, rezervo multe pli grava k riĉa ol Etiopio k ol la iamaj germanaj kolonioj. La fero, la plej grava materialo por la fabrikado de armiloj k militmunicioj, kiu al Germanio, samkiel al Italio mankas, ekzistas abunde en Asturio k en Baskolando. La plej bona kupromino troviĝas en Huelva (Uelva). Ne malproksime de la hidrargominejo de Almaden, la fama minejo de Peñarroya (Penjaroja) liveras altkvalitan plumbon. Aliaj esencaj mineraloj—stano, tungsteno, zinko, arĝento, fosfato, sulfuro, piritoj, karbo, grafito k. c. troviĝas dise en la tuta Preskaŭinsulo. La Hispana Maroko enhavas ankaŭ feron, plumbon k manganon.

La unua ago de Germanio k Italio aperis jam en 1934, kiam sub la helpo de la reakcia registaro stariĝis italogermana kuniĝo por ekspluatadi la hispanian minriĉaĵaron. La Federacio de la Italaj Industriistoj kunlaboris per la duono de la financkapitalo. Flanke de Germanio la "Metallgesellschaft" reprezentis en tiu kuniĝo la firmojn I. G. Farbenindustrie. Krupp, Rheinmetall, Kloenne, Siemens k Halske. Ili elektis kiel teknikan konsilanton G. Dubnikov, blankrusa inĝeniero, kiu laboris kiel fakulo de tungsteno en la "Metallgeschaft". Dubnikov alvenis Hispanion en 1934, malmultajn tagojn post kiam Lerroux (Leru) la granda amiko de la kapitalistoj, sukcesis sufoki la ribelon de Asturio, murdinte pli ol 5000 ministojn.

Dubnikov, helpate de Lerroux k Gil Robles (Hil Robles) starigis sian oficejon en Barcelono, krom eksperimenta laboratorio, k sin dediĉis fari detalan eksperimenton de la hispania teritorio, k de la riĉaĵoj de ĝia subtero. Inter diversaj aferoj li ĉefe interesiĝis pri la lignito-tavoloj, kiujn li abunde trovis en certaj lokoj de Aragon, k Levanto (Orienta Parto de Hispanio) k li alsendis specimenojn al siaj mastroj de la "Metallgesellschaft", informinte, ke iuj el tiuj tavoloj enhavas ĝis 20000000 tunojn k ke la lignito povas esti fluidigata k tiele aliigata en sintezan nutraĵon por motoroj, krom la eblo elĉerpi aliajn devensubstancojn. Pro tiu informo stariĝis militmemorandumo de la kuniĝo, substrekante la gravecon de la sinteza oleo fluidigata en Hispanio, ĉar la submarenoj, la aviadiloj povus sin provizi ĉitie okaze de nova mondmilito. Dubnikov ankaŭ esploris la regionon de Hispana Maroko, kies minriĉaĵaron jam konis la germanoj, ĉar jam antaŭ la mondmilito la faroj de la germana minfirmo Mannesmann en la Preskaŭinsulo, kielsame en Hispana Maroko, finiĝis per la afero Agadir. Forigite pro la milito, Mannesmann pli malfrue repersistis k sukcesis reakiri novajn k avantaĝajn ekspluatadkoncesiojn.

Dum la fino de sia restado en Hispanio ŝajnis, ke Dubnikov simpatiis pli al Italio k eĉ translokiĝis al Italio post la fermo de liaj oficejoj en Barcelono en Aprilo 1936. Dume, kiel la tuta mondo scias, oni forĝis la militribelon kun la kunhelpo de Germanio k Italio. Oni ne konas la ekzaktajn detalojn de l'aranĝo farita inter la hispanaj ribelintoj k tiuj du potencoj. Sed la alveno de germanaj k italaj aviadiloj k poste la invadado de Hispanio fare de trupoj de ambaŭ ŝtatoj, konfirmis la ekzistantan pakton.

La 27an de Aŭgusto 1936 Franko, akorde kun Germanio kreis kompanion en Seviljo nomatan "Hisma Limitada", konstituata per la firmoj "Carranza" k "Bernhardt" kun monopolo pri ĉiuj krudmaterioj el la minoj de Rif. Estas avertinde ke la firmoj Carranza k Bernhardt estis de antaŭ delonge la specialaj reprezentantoj de la germanaj minfirmoj en Hispanio, dependantaj de la t. n. Rowak el Berlino. La nova protokolo, laŭ kiu estis devigate sin regi la monopolo "Hisma Limitada", estis aprobita de Rowak. En la protokolo estas paragrafo, kiu tekstas, ke la mineraltransporto devas estis farata de la germanaj ŝipentreprenistoj k ke la lastaj metos germanajn ŝipojn je la dispono de Hisma-Rowak, sub la protekto de la germanaj militŝipoj.

La italoj, pro motivoj ne tre klaraj ankoraŭ, situiĝis flanke de Franko pli malfrue ol la germanoj k post la mildigo de la germana milithepo, eble ĉar la itala armigada programo estis multe pli progresiĝinta ol la germana k la neceso de mineraloj malpli urĝa. Ĉiuokaze, tamen, la italoj eniris ankaŭ la scenejon por la konkero de la hispaniaj krudmaterioj sufiĉe alarmitaj (timigitaj) vidante, ke germanoj krom la monopolo de la Rif-minejoj, atingis ankaŭ en Decembro favorajn koncesiojn pri la stano de Galicio k la fero de Vigo, k oportune estis ekpluateblaj la tavoloj el vanadio k trungsteno en Ekstremaduro. La afero tiom gravis, ke kelkaj el la multnombraj italaj kontingentoj elŝipigitaj en Kadiz dum Decembro, ne estis destinitaj al la militfronto, sed al la lokoj, kie troviĝis la deponejoj de vanadio k tungsteno tre malproksime de la fronto. Ilia urĝa celo estis malebligi la germana alproprigon de tiuj materioj.

En Septembro, laŭ indiko de Musolini, la italaj trupoj komencis sian agadon kontraŭ Malago, kiun prenis dank' al perfido. Ilia agado devis daŭriĝi en tiu ĉi fronto laŭ la marbordo ĝis fariĝi posedanto de Cartagena (Kartahena) k kun ĝi de la minejoj de fero, lumbo k kupro tie ekzistantaj. Fiaskinta tiu dua intenco, pro la montrita de la milicoj heroeco, la italaj trupoj iniciatis en Decembro atakon al la hidrarga minejo de Almaden, en la fronto de Kordoba, kiu ankaŭ fiaskis. Kiel oni scias, post Hispanio, estas Italio la plej granda produktanto de hidrargo de la mondo, pro kio ambaŭ nacioj havis la kartelon, kiu fiksis la prezojn k kontrolis la mondproduktadon de la menciita substanco. En Oktobro la registaro de la Respubliko nuligis la kartelon pro konvenaj politikaj motivoj k ĉar la abunda minejo de Almaden, ekspluatata intense, povas superregi la mondmerkaton. Italio ĵetis sian atakon por alpropriĝi el la hispanoj al si tiun ĉi minejon.

Intertempe la brita firmo "Aleksandro Pickering k K°" iniciatis pritraktojn por akiri la vendoekskluzivon de la hispana hidrargo, sed diference de la italoj k la germanoj, la angloj ne kompromitas siajn armilojn ŝanĝe de tiu koncesio, sendube, ĉar la britan "demokration" pli timigas la emancipiĝinta k libera Hispanio.

Dum la invadintoj forrabas tiom percepteble la minriĉaĵojn de Hispanio, la internacia kapitalismo alprenas sintenon, kiun oni nur povas konjekti kiel kooperon al tiuj potencoj. En la regiono Rif (Maroko) ekz. la francaj k anglaj minejoj ricevas nenian pagon por ilia mineralo, kiu veturas al Germanio; ĉiuj pagoj, dekalkuliĝas en la armilproviza ŝuldo de Franko. Malgraŭ ĉio, tiuj kompanioj, tiom senteblaj, kiam temas pri iliaj interesoj, montras strangan indiferenton koncerne tiun aferon. Ne nur ili k iliaj registaroj prezentis nenian proteston, sed eĉ la gazetaro de Londono k Parizo, kiu ĝenerale spegulas iliajn opiniojn, metiĝas senkaŝe flanke al Franko.

Sed en Hispanio estas ankaŭ interplektitaj la interesoj de Usono. La alte kosmopolita familio de Rothschild, krom ke havas interesojn en la hidrargminejoj de Almaden, havas en sia posedo la faman plumbominejon de Peñaroya. Ĉu oni ne memoras la brilan ekspluatadon de Peñaroya dum la mondmilito? Tiu ĉi kompanio kunlabore de la "Metallgesellschaft", je kies servo estis Dubnikov, sendis 150z00 tunojn da plumbo al Germanio travoje de Svisio. Hodiaŭ inter la direktoroj de Peñaroya—minejoj estas kelkaj interesaj individuoj: Federiko Leroux, kiu postenas la gvidon de la "Hispana Unio de Eksplodigiloj", hispana kompanio en profitdona proksimeco de Aufschlager, konata en la germana municiindustrio; M. Humbert, el Wendel, kies interesoj pri la municioj etendiĝas en la tuta Rejno, k, laste la itala grafo Eriko San Martino de Valperga. La mortinta Basil Zaharoff, kies interesoj ne konis landlimojn, havis grandan partoprenon en la minejoj de Logrosan, k liaj agadoj en la industrio milita k hispana fariĝis prave famaj ekde la protokolo de la senatoro Nye. Tiuj samaj fabrikoj de la hispana militindustrio, en kiuj Vickers havas fortajn interesojn, laboras nune aktive en El Ferrol k en Kadiz. La Riotinto—minejo laboras frate kun la Metallgeschlaft en la kompanio "Eŭropaj Piritoj Ltd", kiu estas en posedo de tiuj du firmoj k kooperas kun la interesoj de Morgan. Morgan siaflanke havas sian suĉilon metitan en la hispana situacio tra la Telefona Kompanio k la katalunaj fabrikoj de elektra fluo. Ankaŭ estas tie en ludo la firmoj "Deterdina" k "Standard Oil", ankoraŭ enuigataj pro ilia fiasko en la negoco de la petrolo planigata kun Primo de Rivera.

Tra la rigardo de tiu reto da interesoj klariĝas k evidentiĝas la invadado de Iberio fare de Italio k Germanio k la reago, kiun lastatempe ili trovas flanke de Francio, Anglio k eĉ, kvankam iometa, de Usono.

**KOMPILIS: OSBANTO**

*1909 - 13-an OKTOBRO - 1937*

# FRANCISCO FERRER



Jen tuta elvoko. Racionalismo ne akceptas idolkulton. Tial, la racionalista movado ne starigis altaron al sia martiro Francisco Ferrer. Sed lia nomo elvokas al ni belan idealon tute plena de homamaj efektivigindaĵoj k altegaj projektoj.

Ferrer signifas la antaŭgvardion de la revolucia pedagogio. La idealoj de Ferrer ne estas ankoraŭ atingitaj nek superitaj. Trompiĝas tiuj pedagogoj, kiuj certigas la malsukceson de la pedagogiaj ideoj de Ferrer. Certe, oni superis la teknikon pri la lernejaj efektivigendaĵoj, sed la idealo, kiu servis kiel bazo por la sistemo de la Moderna Lernejo, ankoraŭ estas la vertico de tiu angulo, kiu direkte iras al la sociala justeco, bazo de la homa feliĉeco.

Estas certe, ke la nuntempa pedagogio alproksimiĝas al la fundamentaj vidpunktoj de la racionalista sistemo. Sed ankaŭ estas certe, ke ĉiuj novaj pedagogiaj tendencoj forgesas (aŭ timas trakti) la fundamentan problemon de la Moderna Lernejo.

Kvar estis la ĉefpunktoj sur kiuj Ferrer fundamentigis siajn pedagogiajn solvojn:

1. La Sciencpsikologia ekzamenado de la edukato.
2. La plej granda respekto al lia personeco.
3. Adapti la lernejon laŭ la necesoj de la infano, k tute ne, adapti la infanon laŭ la necesoj de la lernejo.
4. Konsideri la lernejon kiel favorema medio por la natura k propramova formado de la liberaj mensoj.

La nuntempaj pedagogiaj sistemoj koincidas kun Ferrer pri la tri unuaj punktoj. La oficiala pedagogio penas transformigi la infanon je perfekta civitano, kiu estos devigata obei la leĝojn k ŝtatajn konsentojn, tute plena de antaŭjuĝoj k socialaj interkonsentoj.

Tiuj, kiuj konas la taskon de Ferrer, scias, ke la spirito de tia pedagogia laboro estis esence kontraŭŝtata. La eldonoj k artikoloj de la Moderna Lernejo klare montras tion. Ĉar Ferrer estis anarkisto k neniu el la efektivigantoj de la oficiala pedagogio havis nek havas liberecanan spiriton.

La Moderna Lernejo ne estis laika. Ferrer fondis kontraŭŝtatan, kontraŭkapitalisman, kontraŭreligian lernejon, tio estas, RACIONALISTA LERNEJO.

Neniu daŭrigis la taskon de Ferrer. Nur la liberecana movado, la konscia k revolucia laboristaro provis daŭrigi tiun laboron. Per sennombraj oferaĵoj (materialaj k moralaj) la sindikatoj, ĉiam persekutataj, la liberecanaj Ateneoj, kiuj estas fidela esprimo pri la spirito de la Moderna Lernejo.

## La lasta sensacio en Valencio

*Valencio (de nia diplomata delegito). Kiel lasta sensacio ĉi-tiea estas notenda la eksterordinara fenomeno, kiu jus registriĝis en la redaktejo de la esperanta gazeto "Popola Fronto". Ŝajnas, ke temas pri fundamenta ideologia aberacio. Sed jen en kio konsistas la fenomeno. Reveninte el Roterdamo, la ĉefredaktoro de "Popola Fronto" forigis el la redaktejo la portretojn de Stalin, Vorošilov, G. Dimitrov, kiuj ĝis nun ornamis la ĉambron. Senpere de tiu nekutima ago li deklaris, ke li, kiel organizita laboristo en la sindikatoj de U. G. T. k C. N. T. ekde nun ditirambados favore al ili. Al F. A. I. li elmontras apartan simpation.*

*Laŭ diro, devenanta el ĉiam bone informitaj esperantistaj rondoj, la redaktejo de "Popola Fronto" baldaŭ vidos sin ornamita per la portretoj de pluraj liberecanaj ideologoj k aktivuloj. Tamen ĝis nun tio ankoraŭ ne estas konfirmita oficiale de la ĉefredaktoro de la menciata gazeto.*

*Okaze de tio la Valencia esperantistaro reagas plurmaniere. Unuj supozas pri vera ideologia aberacio. Aliaj esprimas la opinion, ke la menciata reformo revolucia altrudiĝas pro konsideroj eldonkvantaj k financaj. Sed la plimulto el ili aludas pri rimarkinda elasteco ameba.*

*Ekster tio tamen insiste cirkulas inter la politikaj rondoj esperantistaj la aserto, ke la redaktoro de "Pravda" Kolcov, kiu en ĉiu sia korespondaĵo el Hispanio ne ellasas la okazon insulti k makuli la hispanajn anarkistojn k anarkosindikatistojn, denuncos la fakton antaŭ la rusa cenzuro k kiel plej kredebla sankcio venos la malpermeso de "Popola Fronto" al Sovetio. Tio metas la ĉefredaktoron de "Popola Fronto" antaŭ tre delikata dilemo, tiom pli ke ĝia solvo definitiva dependas organike de la plua evoluado de la poliko. Ĉiuokaze tamen la gazeto estos redaktata provizore laŭ la cirkonstancoj, kiuj aktuale blovas tra la politika stepo.*

---

*La 18an de Oktobro Largo Kabaljero prononcis en Madrido antaŭ amasa publiko diskurson; el kiu ni ekstraktas la sekvantajn paragrafojn:*

*"Nun mi povas diri klare k antaŭ la publiko, ke Largo Kabaljero ne volis esti agento de iuj elementoj, ke Largo Kabaljero defendis la nacian suverenon en la ordo milita, en la ordo politika k en la ordo socia. Largo Kabaljero ne akceptis la kondiĉojn de la Komunista Partio, unu el kiuj estis, ke li ne prenu sur sin la militministerion."*

*"Kion mi ne konsentas estas, ke la junularo de tipo maldekstra inklinas unuiĝi kun elementoj katolikaj, tradiciaj malamikoj de la reĝimo k kaŭzantoj de la aktuala tragedio, dum la partioj devas alpaŝi unue al la redaktado de revolucia programo. Antaŭe la komunistoj starigis kiel kondiĉon la rompiĝon kun ĉiuj burĝaj partioj. Nun ŝajnas, ke ili ne subtenas tion. Mi, se la unuiĝo devas esti, respektante tiujn burĝajn partiojn: mi ne volas la unuiĝon."*

*"Ni povas iri kune kion ni kunsentas, sed la unuiĝo estas idealo, kiu laŭ mia prijuĝo konsistigas difinon, ĉar la anarkistoj aspiras al la perfektigo de la homaro k ĝi estas atingebla kun sinsekvaj evoluoj. Min ne ofendos tio, se estante socialisto, pro evoluo aŭ pro studo mi atingos esti anarkisto, sed min ofendos tio, se mi fariĝus katoliko".*

---

Nune la Regiona Katalun-Federacio de Racionalistaj Lernejoj, laboras senĉese por fidele daŭrigi la taskon de tiu gigantulo en la mondo de la revoluciaj pedagogi-efektivigindaĵoj.

REGIONA KATALUN-FEDERACIO
DE RACIONALISTAJ LERNEJOJ

*TLES-aj IDEOJ*

# ESPERANTISMO KAJ ESPERANTO

Esperanto per si mem ne havas difinitan celon. Oni povas uzi ĝin por diversaj k malsamaj aferoj. K tiuj aferoj povas esti favoraj aŭ nefavoraj al la bonaj agoj.

Malfacile estas difini kio estas la Bono k la Malbono. Sed, oni povas certigi ke kie ajn ĝi estu, Esperanto taŭgas por fari ambaŭ.

Preskaŭ al ĉiuj interesas internacia lingvo. Al religiulo k ateisto; al ŝtelisto k al policisto; al kapitalisto k al laboristo; al komercisto k al artisto; al fanfaronulo k al sciulo. Ĉiuj povas uzi Esperanton por atingi proprajn interesojn.

Tial, ni ne kredas pri la "interna ideo", nek pri la zamenhofaj frazoj "internacia lingvo malaperigos militon k unuigos la mondon". Tre belaj k sentimentalaj vortoj taŭgaj por fari poemon, sed ne por esprimi la realecon.

La neŭtrala esperantista movado, kiu nun propagandas esperantismon, estas senlogika k sensenca movado. Esperantismo estas la doktrina ideo de Esperanto. K ni jam pruvis ke Esperanto ne povas reprezenti doktrinon. Same oni povas krei Internacian Esperanto-Asocion de Religiuloj kiel de Ateistoj. Esperanto estas, kiel internacia lingvo, helpanta rimedo.

Ni estas konsciaj laboristoj. Ni estas socialistoj. Socialismo estas aro da socialaj doktrinoj. K tial, ni neniam devas forgesi tion, ke en la mondo estas du vastaj limoj: la lingva k la sociala.

La lingvaj limoj dividas la homaron. Rasoj, idiomoj, nacioj kreas tiujn limojn. Sed ili estas naturaj, ĉar la diverseco de la Naturo, t. e. la Vivo, produktas ilin. Ĉefe pro tiu lingva diverseco la homaro estas disigita.

Internacia lingvo povas detrui tiun faktoron, kiu baras la homajn interrilatojn. K Esperanto plenumas tiun necesón. Per ĝi nia penso povas direkte iri de Hispanio al Ĉinio, de Rusio al Meksikio. Per ĝi niaj internaciaj ideoj jam tute povas disvastiĝi tra la mondo. Ni jam posedas la rimedon por premi la kunigajn bantojn de la homaro. Dro Zamenhof solvis tiun ĉi gravan problemon.

Sed, malfeliĉe, restas ankoraŭ la sociala limo. Malfeliĉe por ni, ĉar malgraŭ ĉio ni estas homamaj. Ni batalas por atingi la homan feliĉon.

Tamen, ni devas submetiĝi antaŭ la evidenteco. Post detrui la lingvajn limojn, la homaro ankoraŭ ne povas kuniĝi. Ni ne devas peni por pruvi tiun ĉi kruelan realecon. La milito en Hispanio pro klas-interesoj; la milito en Ĉinio por favorigi la japanan kapitalismon; la nuna stato en Germanio k Italio malfavora al laborista klaso; la socialaj bataloj, ĉiufoje plej intensaj, kiuj konstante agitas la mondon, montras al ni la tutan realecon.

K tiu ĉi realeco ,tute plena de ĉagreno, kreas en ni klaskonscion, ĉar antaŭ ĉio, antaŭ ĉiuj homamaj k frataj ideoj ni estas laboristoj, subpremataj laboristoj, kiuj deziras liberecon. Ni ĉiam scios ami, kiam la homaro, ĉiam scios ami.

Nuntempe, dum ni propagandas niajn ideojn, dum ni batalas kontraŭ Kapitalismo k Ŝtato, sinonimoj de sociala maljusteco, ni amas k malamas. Nia klaskonscio estas tio: ami k malami.

Oni ne devas forgesi tiun ĉi limon, kiun Esperanto ne povas detrui. Tial, al nia internacia penso oni devas aldoni nian socialan doktrinon. Ni malamas la limojn, sed ankaŭ ni malamas la klasdiferencojn, kiuj estas en nia propra lando.

Ni scias Esperanton. Sed ni uzas ĝin kiel internacian lingvon por faciligi niajn eksterlandajn interrilatojn, laŭ nia ideologia vidpunkto. Neutrala Esperantismo nenion signifas por laborista klaso. Neutrala Esperantismo estas por la laboristo perdi la tempon, la klaskonscion k la atenton pri siaj propraj interesoj.

Tial, ni grupiĝis k kreis T. L. E. S.-on.

Boris QUERALT

# KION DEFENDAS FRANKO?

De longe en Hispanio oni parolas pri la agrara reformo. Ĝis nun Hispanio estis feŭda lando, kie la plejmulto el la tero apartenis al grafoj, dukoj k markizoj dum la plejmulto el la loĝantaro posedis nenion k devis vendadi sian laborforton al la bienposedantoj.

Post la stariĝo de la Respubliko oni parolis pli intense pri la neceso efektivigi la agraran reformon, sed nur vortoj. M. Domingo, ministro pri la Agrikulturo, kreis sennombrajn komisionojn tiacelajn, sed la praktika rezulto favoris nur la komisiitojn, ne tiujn, kiuj devis prikulturi la teron. Malgraŭ fie dum la respublika periodo oni ne far. . ion, estis videble, ke frue aŭ malfrue, la popolanaro postulos la reformon laŭ sia maniero. La faŝistoj konjektis tiun popolanaran agon k decidis sin defendi. Ekde 19 de Julio 1936 la tuta hispana popolanaro estas ĉe unu flanko de la tranĉeoj, k la aristokrataro k la burĝaro ĉe la alia flanko, kvankam ke la lastaj ne ĉeestas fizike ĉe la tranĉeoj, ĉar ja la fronta klimato ne estas saniga por la nobeloj.

La plimulto el tiuj, kiuj helpadas al Franko, estas la dukoj, markizoj k grafoj. Ĝi tie ni reproduktas la liston de la nobeloj, kiuj estas ĉe la flanko de Franko kun la espero, ke ili konservos al si la plurajn hektarojn da tero, kiun ili posedas.

| | | |
|---|---|---|
| duko Medinaceli . . . . . | 79,146 | hek. |
| duko Peñaranda . . . . . | 51,015 | " |
| duko Villahermoso . . . . | 47,203 | " |
| duko Alba . . . . . . . . | 34,455 | " |
| markizo Romana . . . . . . | 29,096 | " |
| markizo Comillas. . . . . . | 23,719 | " |
| duko Fernán Núñez . . . . | 17,732 | " |
| duko Arión . . . . . . . . | 17,666 | " |
| duko Infantado . . . . . . | 17,171 | " |
| grafo Romanones. . . . . | 15,132 | " |
| grafo Torres Arias . . . . | 13,644 | " |
| grafo Sástago . . . . . . | 12,629 | " |
| markizo Mirabell . . . . . | 12,570 | " |
| duko Lerma . . . . . . . . | 11,879 | " |
| markizo Riscal. . . . . . | 9,310 | " |
| duko Alburquerque . . . . | 9,077 | " |
| grafo Elda . . . . . . . . | 8,323 | " |
| duko Tamames . . . . . . | 7,921 | " |
| markizo Viena . . . . . . | 7,166 | " |
| grafo Toreno . . . . . . | 7,09q | " |
| markizo Narros . . . . . | 6,736 | " |
| duko Sotomayor . . . . . | 5,835 | " |
| grafo Mora . . . . . . . | 6,503 | " |
| dukino Plasencia . . . . . | 5,142 | " |
| grafo Real . . . . . . . | 5,080 | " |
| grafo Real . . . . . . . | 5,142 | " |
| duko Alcudia . . . . . . | 5,080 | " |
| markizo Arienzo . . . . . | 5,065 | " |

**INFORMA BULTENO ESTAS LIBERA TRIBUNO PERESPERANTA KONTRAŬ FAŜISMO EN ĜIAJ PLURAJ NUANCOJ. INFORMA BULTENO, ESTANTE FIDELA ESPRIMANTO DE LA IDEOJ DE C. N. T. K F. A. I., SINTENAS TOLEREME K RESPEKTEME AL ĈIUJ ANTIFAŜISTAJ SEKTOROJ, AL ĈIUJ SINCERAJ ANTIFAŜISTAJ ELEMENTOJ.**

...

*LA TIRANOJ NE POVAS DORMI TRANKVILAJ*

# LA ZORGOJ DE MUSOLINI

**Michael Gold**

Kiel la plejparto el la farsantoj, spekulaciistoj k murdistoj, Musolini ne dormas bone. Antaŭ nelonge liaj noktoj estis teruraj, malgraŭ ke la tagoj ŝajnis al li gloraj k brilaj.

Post la tago ekz., en kiu li diris, ke Anglio marŝas al sia pereo, ĝuste kiam li sendigis ankoraŭ 50000 ĥomojn al la Afrika dezerto li imagis al si, ke faris belegan informon k ne suferis, kiel kutime, pro sia kronika digestado; malgraŭ tio tamen li havis sonĝon aparte malbonan.

Dum la vespero li laboris ĝis malfrue por redakti insultan noton destinitan al Abisenio.

Li glutis la pilolojn por la stomako, demetis la militistan uniformon, k lia lakeo—unu el liaj lakeoj—alportis al li luksan varmigilon.

Lia juna masaĝisto masaĝis lian korpon, simila al tiu de maljuniĝanto, al kiu ĉiufoje estas pli malfacile aldoni aspekton de "Peter Pan", aspekton de junulo floranta, inkluzive diktatoro.

Tamen Musolini sentis sin sufiĉe bone k estis ekdormonta dolĉe, kiam—pang!—vidis sin devigita de la sorto fari la grandan vivon de diktatoro.

Ŝajnis, ke li estis sonĝanta makaronojn, militon k belajn virgajn "Nigraj Kapoj", kiam rapide eniris Napoleon.

—Bonan tagon, Benito—murmuris la malgranda diktatoro kun sarkasma rideto sur la pala vizaĝo.

—Bonan tagon, Bonaparte—diris Benito iom konfuza. Kial vi vizitas min tiel malfrue? Mi devas dormi. K pro kio tia enviema mieno?

—Enviema?—li rediris kun la sarkasma rideto. Enviema al vi, kiu ne vivos pli ol duonjaron, aŭ entute unu jaron, ĉar vi falos en la manojn de murdisto?

—Ba!—diris Musolini. Ĉis nun mi defendis min sufiĉe bone. Mia sorto k mia intelekto helpados al mi ankaŭ estonte.

—Uf!—rediris Napoleon, mi vivis sub stelo pli bonŝanca, mi havis pli da intelekto ol vi, k tamen mi devis atingi la insulon Sankta Elena.

—Mi rifuzas diskuti kun homo, kiu bankrotis,—ekkriis Musolini. Li turnis sin dorsen k premis la varmigilon al sia ventro.

Napoleon estis kreskanta, kreskanta kun siaj insignoj, siaj botoj k sia ĉapelo, plafontuŝaj bekoj. Poste—pum!—li faligis sin sur la bruston de Musolini.

—Eta "Ben", li flustris: ĉiu diktatoro estas bankrotonto. Ĉu vi konas unu, almenaŭ unu, kiu havis veran sukceson? Kvankam vi plu krias kiel ĝis nun, mizera k ŝvela imitanto al mi mem, vi povas trompi nek la Historion, nek min. Kie estas la hieraŭaj diktatoroj? Ili mortis ostracisme aŭ pro ponardo. K iliaj sistemoj fordronis kune kun ili.

—Ne! ne!—kriis "Ben" ekkoleriĝanta. Mi ekzistos ĉiam. La faŝismo vivos mil jarojn!

La spirito de Napoleon faris ion strangan: li ruktis tiel rapide, ke la ĉambro pleniĝis per sufokiga aero.

—Gaso!—diris Napoleon. Ni, la diktatoroj, estas el gaso. Mi kredis povi reteni la popolanaran revolucion, Benito. Sed mi mortis en Sankta Elena k la revolucio daŭris. Ankaŭ vi perfidis al revolucio. Finfine tamen venkos ĝi, ĉar ĝi ĉiam venkas.

—Ĝi? Ĝi?—ekkriis Musolini malŝate. Kiu estas tiu "ĝi"?

—La popolonaro—flustris Napoleon malice. Kion diris Linkoln? Certe dio amas la popolanojn k pro kio kreis ilin multnombre.

Volter kriis: "Ni premegu la perfidulon". Hoyle ekkriis: "La parlamento finigos la paron da gereĝoj".

"Unue pripensu, poste agu". "Birdo en manoj valoras pli ol cento da flugantaj". "La vojo de la gloro kondukas al la tombo".

Li volis daŭrigi per tiaj sensencajoj, sed Musolini saltis furie el la lito k jetis la varmigilon al Napoleon.

La etkortegano malaperis ridante primokeme k lasante post sin malbonodoron el gaso asfiksia k mortiga.

"Muso" tiel nerviĝis, ke ekŝvitiĝis. Li provis ree ekdormi k pensi pri agrablajoj: pri siaj ordenoj, pri siaj uniformoj, pri siaj diskursoj. Sed tiam aperis antaŭ lin longa figuro, pala homo kun alta k pura frunto k tristaj okuloj. Li estis tute nuda k terurigaj vundoj kovris lian korpon de la frunto ĝis la maleoloj.

—Ekster en!—kriis Musolini kun okuloj elorbitiĝantaj. Kiu estas vi?

—Mateotti—diris la longa figuro trankvile. Mateotti, kiun vi murdis pere de viaj banditoj. Tiel kiel vi murdigis milojn da viaj antaŭaj kamaradoj. Vi kredis, ke oni forgesis tion? Ĉu vi mem povas forgesi ĝin?

Mateotti kliniĝis pli al la timigita diktatoro: Perfidulo! Ni akompanados vin ĝis la morto. Ni marŝadon kun vi tra Abisenio k Austrio. Ni estas en la fabrikoj, kie forĝiĝas viaj armiloj. Ni estas en la malgrandaj domoj de la kamparanoj k en la koroj de la patrinoj. Ni akompanos vin ĝis la pendigilo, kiam vi estos pendigata.

—Vi estas mortinta k muta!—ekkriis Musolini. Vi ne estas pli ol zorgeto. En Italio la vagonaroj funkcias ekzakte. Jam komenciĝis la heroa epoko.

Mateotti ne respondis, sed lia silentado estis multe pli teruriga ol ĉiuj vortoj, kiujn li povus prononci.

—Kiu pendigos min?—daŭrigis Musolini. Kiu maltimos?

—La popolanaro—rediris Mateotti, el kies vundoj gutadis sango.

Mateotti malaperis. Al la lito de Musolini proksimiĝis kamparanino malgranda k sulkohava.

—Patrino!—Kion vi serĉas ĉi-tien?ĝemis la diktatoro. Foriru, patrino! Vi ne devas okupi vin pri politiko!

La maljuna virino estis ploranta.

Filo mia — ŝi rediris tra larmoj, pro kio vi estis tiel malbona rilate al via popolanaro? La kamparanoj malsatas, k vi forprenas iliajn filojn por nova milito.

—Patrino, foriru! Mi retenigos vin kiel revoluciulinon!—blekegis la diktatoro senespera.

Sed la patrino daŭrigis triste:

—Via patro estis laboristo k socialisto. Li multe ofendiĝis pro vi k ne volis akompani min por vin averti.

—Averti min? Kontraŭ kiu? Kiun mi devas timi?

—La popolanaron—diris la patrino trankvile. K ŝi malaperis dum Musolini, trenata de kutimo, kriis:

—Retenu ŝin! Donu al ŝi ricinon!

Sed tio ankoraŭ ne estis la fino de la nokto.

Ruĝaj flagoj plenigis la ĉambron dum inundis ĝin la muziko de la Internacio.

"Ben" eligis pistolon k pafis.

Io granda y nigra enpenetris la alkovon. Musolini provis ĝin kapti; li furie puŝis sin por atingi ĝin, sed ne trafis. Revenis Napoleon, nun kun la imperiestrino Josefina; ili dancis sian "kan kan" sur la lito de Musolini k dancante degutadis sango.

Iu renversis plenan skatolon da militordenoj k li ne povis respiri.

Poste li veturis per aeroplano k el la ĉielo falis citronoj, flugfolioj k "spacchetti". K la flugiloj de la aeroplano rompiĝis. Li estis falanta, falanta... Ĉu neniam estis finiĝonta tiu disvolviĝo?

La Caro eniris ĉekape de armeo da nudaj princinoj. Ili ridis k primokis Musolini-n. Li devis vomi.

Juna itala kamparano ludis flaŭton. La flaŭto aliiĝis en maŝinpafilon k pafadis al li. K refoje ruĝaj flagoj k la Internacio de lia infanaĝo.

Lia patro, forta ferforĝisto, mardeladis sur la kapon de Musolini laŭ la ritmo de la muziko.

Baldaŭ la diktatoro komencis ĝemi terure. Oni ja estis pendigantaj lin!

—Panjo!—li ploris. K li vekiĝis.

—Help! Help! Lumon!

La servistoj alkuris. Ili ja estis alkutimintaj al liaj zorgoj k alkuris kun lumigiloj.

Musolini eksidis, tremante, antaŭ la skribotablon k skribis serion da novaj k teruraj instrukcioj...

**Tradukis: PARIO**

# KRONIKO

La 3an de Oktobro okazis en Cuenca (Kuenka) granda mitingo. Ĉe plenplena salono paroladis la k-doj Amor Buitango, G. Martin k Falomir.

K-do Buitago atentigis "Ni, la anarkistoj ne estas fanatikuloj k ni ne alkutimas imponi batale la Anarkion, ĉar ni priatentas, ke ĉe nia flanko batalas la respublikanoj, la komunistoj, la socialistoj k aliaj antifaŝismaj tendencoj. Sed ni volas la respekton al ĉiuj, ĉar la kruela realo tiel postulas ĝin. La politika situacio enlanda k eksterlanda en la nunaj momentoj estas, kiu pleje nin okupigas, ĉar tiel eksterlande, kiel enlande oni celas strangoli la revolucion, antaŭ ol ĝi plasmiĝas en realaĵon! Aliparte ni devas kontraŭi la manovrojn de unuj elementoj nekomprenemaj. Ni, kiuj 18an de Julio 1936 k antaŭe sciis lukti kontraŭ la ŝturmoj de la reakcio k ni havis respekton al la ceteraj sektoroj, kiuj hodiaŭ sin montras malamikaj, se ili ne korektos sian konduton, en analoga situacio ni ne plu respektos ilin."

K-do Martin paroladis, menciante epizodojn el la revolucioj germana k itala k venis al la konkludo, ke la demokratio ĉiam faras koncesiojn ĝis alveni laŭ senhonta maniero al faŝismo. Pro tio ne estas pli ol du solvoj: aŭ socia revolucio aŭ faŝismo.

K-do Falomir paroladis priskribante elokvente la vojon sekvatan de la anarkismo, vojo plena de dornoj, kiujn surpaŝis niaj plej bonaj kamaradoj, movataj de la idealoj al libero k humaneco.

* * *

La 10an de Oktobro okaze de la 28 datreveno de la fusilmortigo de Francisco Ferrer, liaj disĉiploj instruistoj, kiel ĉiujare, vizitis lian tombon, sur kiun ili metis florojn.

Ĉeestis la nepino de Ferrer, sed lia filino Trinidad ne povis ĉeesti pro malsaniĝo, kiu retenis ŝin en Valencio.

Ĉe la surtomba flormeto prononcis paroladeton Jaime Duran. Li alparolis la ĉeestantojn, admonante ilin al plua persistado en sia laboro.

Fine la instruisto Victoriano Cellero legis versaĵon dediĉitan al la fondinto de la Moderna Lernejo.

* * *

Laŭ deklaro de gravulo el la nova reĝimo de Katalunio, en Barcelono la nuna nombro de la ŝturmgvardianoj ascendas ĝis 20000. Ilia entuta nombro en Katalunio atingas 60000. Policarmeo supermoderne armigita per maŝinpafiloj, kanonoj, tankoj. Ili povus, laŭ la deklaro de la sama gravulo, por kompare mallonga tempo bati la faŝismon ĉe la fronto k atingi al Salamanka k Seviljo.

* * *

C. N. T. ellaboras projekton pri la konstruado en Pedralbes (Barcelono) parkon por kuracado k ripozado. Tiecele okupiĝos la bienoj de la eksmonaĥejo de Pedralbes, ĉirkaŭataj de pinarbaroj. En la mezo konstruiĝos masiva domo 8— etaĝa destinota al hospitalo por malsanaj laboristoj. En tiu domo loĝiĝos ĉirkaŭ 800 malsanuloj. Malantaŭ tiu domo leviĝos la ceteraj domoj por la servistaro k la inventaro. En la bieno "Clot Monserrat" konstruiĝos moderna departamento por maljunuloj, kiuj antaŭ ol fini sian vivon, povu ĝui la humanan rezulton de la Revolucio.

Krome konstruiĝos alia domo por neresanigeblaj malsanuloj, kiuj estos provizataj per ĉiaj komfortoj k estos entreprenata ĉio ebla por fari pli elportebla k malpli kruela ilian vivon. Por la sama celo stariĝos diversaj laborejoj, alireblaj por ties konoj. Aranĝiĝos granda biblioteko.

La plenumadon de tiu grandioza projekto, C. N. T. komisias al kamarado Muñoz.

* * *

14 antifaŝistoj el Milano estis irigitaj antaŭ la speciala tribunalo. La atento estis centrigita super la pentristo Aligi Sassu, konsiderata kiel ĉefo de grupo da socialistoj. Lia agado disvolviĝis ekde la pasinta aŭtuno. Li veturis ofte al Francio k Svisio k reveturis kun propagandiloj, kiuj estis reproduktataj en Milano k tuj distribuataj. La plejparto el la akuzatoj estas intelektuloj, inter ili figuras Rodolfo Morandi, Lucio Luzzato, Mario Venanzi, konsiderata kiel ĉefo de la komunistoj en Milano, Fr. Antolini k Luigi Maŭri, ĉiuj doktoroj. Ili rifuzis reciprokan konon. Rabazzoli, akuzata pro transsendo al eksterlando de notoj koncerne al la veturigo de "volontuloj", ne rekonis la akuzojn. La proceso disvolviĝis ĉe fermitaj pordoj antaŭ la "speciala Tribunalo por la ŝtatdefendo". Ĉi tribunalo havas esceptajn rajtojn. Ĝi konsistas el militistoj k faŝistaj milicanoj. La aktiveco de ĉiuj procesatoj limiĝas preskaŭ al la propagando kontraŭ la milita interveno en Hispanio.

Aliaj procesatoj, kiuj tamen ne estas retenitaj, estos juĝataj. Ili estas: Pallance Ruggimenti, kiu loĝas en Parizo k Guiseppe Farabelli, aktuale en Svisio. Estas kondamnitaj al 12 jaroj Luzzato, Vinaci, Rabazzini k Testa.

* * *

Antaŭ la Majaj okazintaĵoj ekzistis en Barcelono preskaŭ en ĉiu kvartalo kolektiva manĝejo, kie la kripluloj, senlaboruloj, prostituinoj k. a. ricevadis senpage manĝaĵon. Dank' al tiuj kolektivaj manĝejoj evitebliĝis multaj sociaj malbonaĵoj, kiel ekz. ŝtelado, almozpetado, malsato. La prostituado limiĝis. Ĉiuj tiuj kolektivaj manĝejoj estis starigitaj k subvenciataj de C. N. T.

Post la Majaj okazintaĵoj tamen ili estis forigitaj. La hoteloj, kiuj servis kiel manĝejoj, estis forprenitaj k redonitaj al la posedintoj. Ĉi ĉio rezultigis la reaperon sur la stratoj de almozuloj, pliigon de la malsato k plivastigon de la prostituado.

* * *

La ĵurnalo "Gazeta" deklaris, ke ĝis nun 15000 italoj pereis en Hispanio luktante ĉe la frontoj.

* * *

SIA, kies precipa k fundamenta tasko estas helpi la viktimojn de la faŝismo, organizas por la antifaŝistaj arestitoj en la popola Hispanio Bibliotekon. SIA direktas specialan peton al ĉiuj eksterlandaj kamaradoj sendi diversajn nacilingvajn librojn, kiuj estos donataj al la alilandaj kamaradoj, kiuj komence venis al Hispanio por batali kontraŭ faŝismo, sed kiuj nun troviĝas en la Barcelona k aliurbaj karceroj. La libroj estu alsendataj al la jena adreso: SIA, av. Durruti, 32-34, Barcelono.

* * *

En Kopenhago aperas nova esperanta revuo "Leviĝo". Ĝi estas redaktata de k-do Tage Laŭ kiu pasigis 3 monatojn en la karceroj de Hitlerio. La enhavo de la revuo estas revolucia. La aperinta unua kajero represas la leteron de k-do Bas Wels, leteron kiun ni siatempe aperigis. La adreso de "Leviĝo": Tage Laŭ, Kjelsgaardsvej, 33, Kopenhago, Danio.

* * *

La ŝipoj "Hestia" k "Kronos" transdonis en Amberes al la ŝipo "Bessel", kiu forveturis al Bremen, la korpojn de la germanaj soldatoj pereintaj en Hispanio. La korpoj troviĝis metitaj en lign-skatoloj k estis necese meti inter ilin bovfelojn por malperceptebligi la malbonodoron de la "ŝarĝo".

